

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Printempo

Vinnikova Nina [Novoaltajsk, Rusio]

2005

Kiel Viktor Aroloviĉ, konata soveta kaj rusia aktivulo iĝis esperantisto
verkoj de niaj legantoj — diversaj ondoj el bunta mondo gramatiko amuze
kaj serioze — aforismoj — anekdotoj — ripozejo
anoncoj kaj invitoj — korespondu!

2

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis. rue de la Crisatie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Qucsada n=BA 14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckevagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

En tiu ĉi numero vin atendas sufiĉe bunta temaro kaj multaj nomoj de niaj kontribuantoj, novaj kaj malnovaj.

En la rubriko "Kiel tio komenciĝis?" rakontas pri sia esperantistiĝo Viktor Aroloviĉ, konata soveta kaj rusia esperantisto.

Donald Jacob Uitvlugt el Usono ŝatas verki mem kaj atente legas E-literaturon. Rezulto de lia intereso al kreado esprimiĝas en esoj. Tiu ĉi estas jam la dua lia laboro por "K".

Tute nova nomo el Hispanio Alejandro Pareja. Li tradukis mezepokan hispanan rakonton.

Ĉe la rubriko "Diversaj ondoj el bunta mondo" estas informo pri tre interesa projekto de kuraĝulo el Italio Marino Curnis, kiu planas piede trairi 40.500 km tra 26 landoj. Ankaŭ li estas kreema persono, verkas kaj tradukas.

Sekvas tradiciaj rubrikoj pri gramatiko, aforismoj, anekdotoj, enigmoj. Ĉe la 15-a paĝo estas prezento de nova libro de A.Radajev pri poezio de N. Hoĥlov. Adresojn por korespondi kiel ĉiam vin atendas sur la dorsa kovrilpaĝo.

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2005 numero 2 // (52) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteuropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,


Екатеринбург, аб. яш. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

Sola kondiĉo - nepre menciĝi KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties lokojn.

*Viktor Semjonoviĉ Aroloviĉ, elstara sovetia kaj rusia esperanto-aktivulo, elektiĝis kiel prezidanto de SEJM *, kunredaktoro de "Rusia Esperanto-Gazeto" kaj redaktoro de kelkaj E-libroj, inter kiuj "Vojaĝo en Esperanto-lando"*

Mi aliĝis al la E-movado por la tuta vivo



En la jaro 1966 mi estis 20-jara studento en la mekanik-matematika fakultato de Moskva Universitato. Tiujare la universitata teatra studio veturigis al TEJO-kongreso en Hungarion la esperantigitan spektaklon "Cimo" de V. Majakovskij. *) Aŭtune la studianoj kaj aliaj universitataj esperantistoj organizis grandan propagandan vesperon, kies afiŝon mi ial preteratentis. Sed rezulte de tiu vespero en MGU fondiĝis E-societo, kiu tuj organizis kelkajn E-rondetojn. Unu el tiuj rondetoj ekfunkciis en nia fakultato, kaj ties anoncon mi ja rimarkis.

Al tiu rondeto mi aliĝis senhezite, kion influis du cirkonstancoj. Unue, ankoraŭ estante lerneano mi legis pri Esperanto en iuj periodaĵoj, do mi havis pri ĝi surfacan imagon kaj tenis ie en la kapo la ideon, ke se aperos ebleco lerni tiun neordinaran lingvon, necesus bonuzi la ŝancon. Due, en nia tria kurso oni devis viziti specialajn lekciaĵojn, kiuj okazis vespere, samkiel la E-rondeto. Do estis tre bonŝance, ke la semajntago de la E-rondeto (ĵaŭdo) ne koincidis kun tiuj de la specialaj lekciaĵoj, jam elektitaj kaj ekvizititaj de mi.

Do, la 17-an de novembro mi, kun pura kajero, skribilo kaj speciale aĉetita Rusa-E-vortaro de Bokarjov (eldonita ĝuste tiujare), venis al mia unua E-leciono. Ĉeestis ĉirkaŭ dudeko da samfakultatanoj. Gvidis la rondeton aspiranto Aleksandro. Tiam mi tre atente notis ĉion diratan de li, poste, kiam mi jam maturiĝis, mi relegis la kajeron kaj komprenis, ke Aleksandro instruis al ni iom strangan Esperanton.

Ekzemple, li intermiksas la vortojn "apenaŭ" kaj "almenaŭ", rakontante pli la sufikso "um", li donis ekzemplon "listo - listumi" (en la senco "folio - foliumi"); laŭ li "miaŭo" estis sinonimo de "kato"; kaj li estis certa ke en Esperanto estas korektaj t.n. absolutaj frazkonstruoj (ekzemple, "Mi vekigo, la koko kronte [= kiam la koko krios]"). Aleksandro estis nemovadema, kabineta esperantisto kun ne tre firma lingvoscio, iuj klaĉis ke li estas kaŝita idisto...

Sed en la komenca stadio mi tiujn nuancojn ne distingas. Mi diligente reskribadis ĉion, kion Aleksandro skribis sur la tabulo, kaj klopodis papage ripeti la buŝajn ekzemplojn, perceptante la vortojn bloke, sen enpensiĝi pri ties gramatika strukturo. Rezulte mi povis, se la instruanto prononcis la necesan vorton ne tre klare, diri ekzemple "verŝani" anstataŭ "verŝajne".

Poiomete nia anaro komencis maldensiĝi, al la lecionoj venadis ĉiufoje malpli da rondetanoj. Mi tion ne atentis kaj persiste vizitis ĉiun lecionon. Aleksandro rimarkis mian aktivecon kaj, post kiam la rondeto paŭzis por vintraj ferioj, trovis min kaj komisiis pendigi anoncon pri renovigo de la lecionoj. Mi entuziasmiĝis kaj, arminte min per la Bokarjova vortaro, faris la anoncon dulingva. Aleksandro legis ĝin, jam pendigitan, kaj diris ridetante: "Bonan afiŝon vi faris. Vere, gxi enhavas dekon da eraroj; ne gravas, sekvafoje estos malpli".

Aleksandro iam rakontis al ni pri la universitata E-societo, pri ĝiaj estraranoj (al kiuj ankaŭ li apartenis), preskaŭ ĉiuj ili gvidis la paralelajn rondetojn. Tiuj estraranoj ŝajnis al mi iaj ĉielogantoj, kaj kiam li diris, ke mi faras sukcesojn kaj meritas perspektive iĝi estrarano, mi tre miris. Certe tiam mi ne imagis, ke poste mi vere apartenos eĉ al multe pli gravaj E-estraroj...

Tamen baldaŭ estis oportuna okazo por vidi vive tiujn misterajn estraranojn. En Moskvo gastis tiama prezidanto de UEA Ivo Lapenna, kaj la societo invitis lin prelegi en MGU. Mi memoras ne tro grandan ĉambron, dense ŝtopitan de homoj: esperantistoj, universitataj kaj el aliaj moskvaj E-klubo, kaj neesperantistoj. La kunvenon gvidis Vladimir Samodaj, prezidanto de la E-societo. Lapenna prelegis en Esperanto, Vera Zlotnikova interpretis rusen. La temo, kiom mi memoras, estis klasika: la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj Esperanto kiel ĝia optimuma solvo. Lapenna oratoris bele, sed kapti tuj la sencion mi ankoraŭ ne kapablis kaj orientiĝis al la buŝraduko. Fine de la prelego okazis anekdoto. Iu ne tro sagaca aŭskultinto demandis: "Vi tiel bele laŭdis Esperanton, sed ĉu vi povas diri en tiu lingvo almenaŭ kelkajn vortojn?". Tondra ridego de la publiko estis la plej elokventa respondo...

Sed mi revenu al nia E-rondeto. Ĝia anaro plu degelis, kaj kiam ni restis 2-3-ope, Aleksandro diris: "Sufiĉas. Instrui plu mi ne vidas sencion". Kaj li transdonis nin al alia Aleksandro - nun loĝanta en Usono Alex Kharkovsky, sed tiam

Aleksandro Ĥarjkovskij, kies rondeto ankoraŭ ne atingis la disfalan stadion. Li gvidis sian rondeton pli vigle ol nia instruinto, kaj liaj lernintoj pli progresis en la lingvo. Mi provis samritiĝi kun ili, sed ne tre sukcese, kaj Aleksandro diris rekte: "Viktoro, vi postrestas". Li donis al mi bibliografian rarajon - la faman lernolibron de Rublov, kaj mi ekster la lecionoj tre atente legis ĝin kaj pliriĉigis mian E-vortprovizon. Estis jam majo, la vetero estis tre varma, kaj mi faris tion dum la sunbruniĝado, kuŝante sur la larĝa fenestrobreto de la universitata komunloĝejo.

Tamen necesis subteni la sciojn praktike. Feliĉe inter la novaj samrondetanoj estis Jefim, mia samkursano kaj komunloĝeja najbaro. Li proponis al mi ekzerci la langon, babilante en Esperanto duope. Mi kun plezuro konsentis, kaj ni esperantumis preskaŭ ĉiutage: iam li venis en mian ĉambron, iam mi reciprokis, sed plej ofte ni, por ne ĝeni la najbarojn, promenis tra la longaj komunloĝejaj koridoroj kaj parolis, parolis...

Nian entuziasmon firmigis la dumleciono informo de Ĥarjkovskij pri la okazonta en Litovio junulara E-tendaro (BET-9, alinome SEJT-9). Certe li diris, ke tie ĉiuj parolos nur en Esperanto kaj necesas scii la lingvon pli bone ol nun. Jefim kaj mi decidis, ke ankaŭ ni nepre veturu tien. Ni plu ekzerciĝis eĉ kun duobla vervo, malgraŭ la proksimiĝanta sesio. Jefim havis magnetofonon, kaj ni uzis ĝin por perfektigi la E-prononcon.

Do, al la lasta leciono en la rondeto de Ĥarjkovskij mi jam multe progresis en la lingvo. Por partopreni en la tendaro Aleksandro donis al mi paperon kun la ne renkontita ĝis tiam vorto "Aliĝilo". Sed ĝian sencon mi komprenis senprobleme.

Mi plenigis la aliĝilon (ankoraŭ ne sciante, ke per tio mi aliĝis al la E-movado por la tuta vivo), pagis la kotizon kaj komencis malpacience atendi la tendaron.

Rapide pasis la sesiaj kaj feriaj semajnoj, kaj finfine venis la tago, kiam mi venis en mian unuan E-tendaron. Sed tien mi eniris jam ne kiel komencanto, sed kiel egala inter egalaj.

* SEJM - Sovetia Esperantista Junulara Movado

Nikolaj Nosov

Esperantigis el la rusa Aroloviĉ Viktor [Moskvo, Rusio]

Viva Ĉapelo

Sur la komodo kuŝis ĉapelo, katido Bazilo sidis surplanke apud la komodo, dum Voĉjo kaj Vaĉjo sidis ĉe la tablo kaj kolorigis bildojn. Subite malantaŭ ili io brue falis surplanken. Ili retroturniĝis kaj ekvidis surplanke apud la komodo la ĉapelon.

Voĉjo alpaŝis al la komodo, kliniĝis, dezirante levi la ĉapelon, kaj subite ekkris:

— Aj-Aj-aj! - kaj kuris flanken.

— Kio okazis? - demandis Vaĉjo.

— Ĝi estas vi-vi-viva!

— Kiu estas viva?

— La ĉap-ĉa-pelo.

— Kion? Ĉu ĉapeloj povas esti vivaj?

— Ri-ri-gardu mem!

Vaĉjo proksimiĝis kaj ekrigardis la ĉapelon. Subite la ĉapelo ekrapis rekte al li. Li ekkris:

— Aj! - kaj saltis sur la divanon. Voĉjo lin sekvis.

La ĉapelo atingis mezon de la ĉambro kaj haltis. La knaboj rigardis ĝin kaj tremis pro la timo. Tiam la ĉapelo turniĝis kaj ekrapis al la divano.

— Aj! Oj! - ekkris la knaboj.

Ili desaltis de sur la divano kaj kuris for el la ĉambro. Enkurinte en la kuirejon, ili fermis post si la pordon.

— Mi f-f-for-foru! - diris Voĉjo.

— Kien?

— Mi revenu hejmen.

— Kial?

— Mi la ĉapelon ti-timas. Mi unuafoje vidas, ke ĉapelo promenas en ĉambro.

— Sed eble iu ĝin tiras per ŝnureto?

— Do iru kaj rigardu.

— Iru ni kune. Mi prenu la hokeilon. Se ĝi nin atakos, mi frapos ĝin per la hokeilo.

— Atendu, ankaŭ mi prenu hokeilon.

— Sed ni ne havas kroman hokeilon.

— Do mi prenu skibastonon.

Ili prenis la hokeilon kaj la skibastonon, malfermetis la pordon kaj enrigardis la ĉambron.

— Kie ĝi estas? - demandis Vaĉjo.

— Jen tie, apud la tablo.

— Tuj mi ĝin frapu per la hokeilo! - diris Vaĉjo. - Nur alrampu ĝi pli proksime, vagulaĉo!

Sed la ĉapelo kuŝis apud la tablo kaj ne moviĝis.

— Ha, ĝi ektimis! - ĝojis la knaboj. - Ĝi timas rampi al ni.

— Tuj mi ĝin fortimigu, - diris Vaĉjo.

Li ekfrapis la plankon per la hokeilo, kriante:

— Hej ci, ĉapelo!

Sed la ĉapelo ne moviĝis.

— Ni prenu terpomojn por pafi al ĝi, - proponis Voĉjo.

Ili revenis la kuirejon, prenis el korbo terpomojn kaj komencis ĵeti ilin al la ĉapelo. Ili ĵetadis, ĵetadis, fine Vaĉjo trafis. La ĉapelo suprensaltis!

— Miaŭ! - ekkris io. Kaj jen, el sub la ĉapelo elŝoviĝis griza vosto, poste kruro, kaj poste la katido mem elsaltis.

— Bazilo! - ekĝojis la knaboj.

— Verŝajne, ĝi sidis surplanke kaj la ĉapelo falis sur ĝin de sur la komodo, -konjektis Voĉjo.

Vaĉjo, kaptinte Bazilon, komencis ĝin brakumadi:

— Bazilĉjo, karuleto, kiel do vi trafis sub la ĉapelon?

Sed Bazilo nenion respondis. Ĝi nur snufis kaj fermetis la okulojn kontraŭ lumo.

Julio Baghy

Kiel Mihok instruis angle

fragmento

Legante en Esperanto nia abonanto kaj komencanta aŭtoro el Usono Donald Jacob Uitvlugt mem provas verki eseetojn pri la tralegita. Unu eseon ni jam publikigis en "K"-2004/5. Nun li sendis al ni ankoraŭ unu provon en tiu ĝenro. Sed dekomence malgranda citaĵo el lia letero.

Donald Jacob Uitvlugt [South Bend, Usono]

Mi libere konfesas, ke mi estas nur meznivela Esperantisto. Sed mi penas plibonigi mian lingvopovon, inter aliaj rimedoj ankaŭ per legado de klasikoj de nia lingvo. Por lerni la bonan lingvon, oni devas renkonti la bonan lingvon. Ĉi tiu legado konatigis al mi la kreaĵon de Julio BAGHY, Miĥaelo Mihok. (Vidu ekzemple "Kiel Mihok instruis angle", en Nova esperanta krestomatio)

"Amikoj de Miĥaelo Mihok..."

eseeto

Mihok estas simpla homo, iama tajloro. Sed en plejparto de la rakontoj li estas militkaptito kaj perforta servisto de rusa leŭtenanto en Siberio. Li estas esperantisto kaj revas fondi la "In-Tu-As-Es-Ta-He"-n (t.e. la Internacia Tutmonda Asocio de Esperantistaj Tajlorhelpantoj), kies insigno estas verda stelo trapikita per pinglo kaj kudrilo. Li ja estas komika figuro, sed li ankaŭ estas tipo de la vere "homeca homo". Li tipigas tiun homecon, kiu kuŝas ĉe la koro de la tuta verkaro de Baghy.

De kio konsistas la homeco de Mihok? Mihok estas malgranda homo, sed homo kun grandaj revoj, kun granda animo. Estas io...fabela ĉirkaŭ li. Tamen li ankaŭ estas heroo — li estas ekzemplo de fabela heroo, la tajloreto, simila al la tajloreto, kiu "mortigis sep per unu bato". Lia revemo estas ja lia grandeco. Mihok scias, ke li estas malgrandulo. Malgraŭ tio, li ankoraŭ revas siajn revojn. Kaj li vere ŝanĝas la mondon; kompreneble nur malgrande, sed vere. Eble ni... Ne, mi parolu nur pri mi. Eble mi devus iom similiĝi al Miĥaelo Mihok. Mi devus iĝi homo, fidela en la malgrandaj. (Kp Luko 16,10: "Kiu estas fidela en la plej malgranda afero, tiu estas fidela ankaŭ en multo...") Do ne fiere, mi nomas min "Amiko de Miĥaelo Mihok", en la espero, ke mi estu vera amiko, vera "alter ego", alia "mi-o" al li. Mi pensas, ke eble nia movado, nia mondo bezonas multajn da "Mihok"-ojn. Lia ekzemplo estas tie por ĉiuj.

Mi ankaŭ esperas, ke mi ne estas sola en ĉi tiu afero. Ke mi trovos multajn Amikojn de Miĥaelo Mihok tra la tuta mondo. Sed eble mi estas nur revulo...

...

Mihok eklevis la ŝultrojn, gapis al la folioj, kiujn Petroff minace svingis antaŭ lia nazo.

— Mi ne scias, - konfesis Mihok.

— Vi nje scijas, Mihok, nje scijas? — kriis Petroff kaj kunfrapis la manojn. — Angla gazeto, Mihok, angla gazeto... Nun vi scias.

Sub la haŭto de Mihok la frostotremo komencis kaŝludon.

— Ne diru, sinjoro leŭtenanto... ĉu vere?

Sed jes, mi diras, .. angla gazeto... Legu! The-London njevs... Mi ne komprenis eĉ vorton... Legu!

Mihok transprenis la foliojn, rigardis ilin kun terurstreĉitaj okuloj, sed post momento maŝinrapide fluis vortotorento el lia buŝo.

Enlamondonvenisnovasento... tralamondoirasfortavoko... perflugilojdefacilavento...


— Ĉe Petroff admiro sekvis la koleron kaj dubon.

— Vi scijas legi. Tutje bonje vi scijas legi! Kijel, ke mi nje scijas?

— Vi forgesis, verŝajne, sinjoro leŭtenanto, ke la angloj ne tiel skribas, kiel ili parolas. Ekzemple, ili diras: "Bonan matenon, Sinjoro" kaj ili skribas "The Szentantalkam, segit mcg!" (hungare: Sanktantonĉjo, helpu min!) Ĉu vi komprenas? — kaj por konvinki la miregantan leŭtenanton pri sia pravo li serĉis inter la ilustraĵoj unu, kiu figuris ekzotikan tribestron kaj anstataŭ subbilda teksto li komencis legi *Historion de Homaro* el lernolibro de E. Privat. Tion li sciis parkere kaj la teksto, se iom lame, tamen taŭgis: "Kiam la maljuna reĝo de Persujo mortis, lia filo, la juna princo Zemir eksidis sur la tronon..."

Petroff kontentigite foriris. De tiu tago Mihok skrupule atentis la horizonton, ĉu ia anglo ne aperos por renversi ĉion? Tiuokaze la leŭtenanta moŝto certe ekspedos lin afrankite al la alia mondo... eble sen kapo. Ĉiutage li promesis novan dekduon da kandeloj kaj pasis longaj monatoj sen notinda okazintaĵo.

Petroff jam bonege parolis la *anglan* lingvon kaj ankaŭ Mihok rekonis en sia leŭtenanto la ĝeneralan bonkorecon de la rusoj kaj flame-man entuziasmon por belo kaj bono.



Dalmatova Daŝa [Jelec, Rusio]

Esperantigis Alejandro Pareja [Madrid, Hispanio]

Estas rakonto el hispana libro de la 14-a jarcento, verkita de la princo Johano Manuel (1282-1347)

Don Juan Manuel (en moderna hispana lingvo) verkis librojn pri moralo kaj pri la devoj de kavaliroj. La plej fama verko de Johan Manuel estas "Grafo Lukarno", kolekto de 51 rakontoj, iuj el kiuj aperis multe poste reverkitaj de fumaj aŭtoroj, kiel Ŝekspiro (La dresado de la merego), Andersen (La novaj vestoj de la reĝo) aŭ La Fontaine (La Vulpo kaj la korako).

La reĝo kaj la viro, kiu diris ke li scipovas fari oron per alĥemio

Iun tagon grafo Lukarno, parolante kun sia konsilanto Patronio, diris al li:

— Patronio, unu homo venis al mi kaj diris, ke li povas fari tiel, ke mi gajnu multe da mono kaj honoro, kaj por tio nur necesas, ke mi donu al li iom da mia havaĵo, por ke li komencu la entreprenon, kaj poste mi gajnos dekoble pli, ol tiom, kiom investos. Dio donis al vi bonan saĝon, mi petas vin diri vian opinion pri la afero.

— Grafa moŝto, mi ŝatus, ke vi sciu tion, kio okazis al iu reĝo kaj viro, kiu diris ke li scipovas fari oron.

La grafo petis la Patronion rakonti.

— Sinjoro grafo Lukarno – diris Patronio, — iu viro estis granda fripono kaj li tre deziris riĉiĝi por lasi sian mizeran vivon, kiun li havis. Kaj tiu viro eksciis, ke iu ne tre prudenta reĝo klopodadis fari oron per alĥemio.

Kaj la fripono prenis cent uncojn da oro kaj li disfajlis ilin kaj li miksis la orajn fajlaĵojn kun aliaj substancoj kaj li faris cent bulojn, kiuj enhavis po unu unco da oro, krom la aliaj substancoj, kiuj li miksis kun la fajlaĵoj. Poste li, bone vestita, iris en la urbon kie estis la reĝo, kaj portis la bulojn en vendejon de spicisto por vendi ilin. Kaj la spicisto de mandis al li por kio taŭgas tiuj buloj; tiam la fripono diris, ke ili taŭgas por multaj aferoj kaj, ĉefe ĝi estas ingredienco nepre bezonata por fari oron per alĥemio. Kaj li vendis al la spicisto ĉiujn cent bulojn kontraŭ du-tri uncoj da oro. Kaj la spicisto demandis lin, kiel nomiĝas tiaj buloj, kaj la fripono diris, ke ili nomiĝas *tabardio*.

La fripono loĝis iom da tempo en tiu urbo vivante kiel tre eleganta homo, kaj li diris sekrete al kelkaj personoj ke li scipovas fari oron. Tiu novaĵo trafis al la oreloj de la reĝo, kiu sendis venigi lin kaj demandis lin, ĉu li scipovas fari oron? La fripono, kvankam li unue ŝajniĝis, kvazaŭ li volus kaŝi la sekreton, asertante ke li nenion scias, finfine tamen konfesis, ke li ja scipovas fari oron; sed li konsilis al la reĝo ke neniu ajn persono en la mondo sciu pri tiu sekreto kaj ke la reĝo ne risku per granda parto de sia mono. Sed li ankaŭ diris, ke, se la reĝo deziras, li

povas montri al la reĝo la proceduron kaj instrui ĉion, kion li scias. La reĝo multe dankis lin, opiniante laŭ tiaj vortoj, ke en tio ne povis esti iu ajn trompo. La fripono donis al la reĝo liston de ingrediencoj. Ĉiuj estis facile troveblaj substancoj, kaj inter ili estis buloj da *tabardio*. Kaj la reĝo mendis ĉiujn ingrediencojn, kiuj kostis entute nur du-tri ŝilingoj. Kiam la ingrediencoj estis pretaj, oni miksis kaj fandis ilin antaŭ la reĝo, kaj en la fundo de la krisolo aperis unco da oro. La reĝo, vidante ke per ingrediencoj kiuj kostis nur du-tri ŝilingoj oni faris unu uncon da oro, multe ĝojis kaj konsideris sin la plej bonsorta homo en la mondo, kaj li petis la friponon (kiun la reĝo taksis kiel tre honesta homo), ke li faru pli da oro.



La fripono respondis, kvazaŭ li ne pli sciis pri tio:


— Reĝa moŝto, mi jam instruis al vi ĉion, kion mi scias, kaj de nun vi scipovas fari ĉi tion tiel bone kiel mi. Sed sciu bone, ke se mankos iu ajn el ĉi tiuj ingrediencoj, oni ne povos fari oron. Kaj post tio li petis permeson foriri kaj reiris al sia hejmo.

La reĝo provis fari oron sen la majstro, kaj li duobligis la kvanton de la recepto, kaj li faris du uncojn da oro. Li denove duobligis la kvantojn kaj faris kvar uncojn, kaj ju pli da kvanto li uzis, des pli da oraj uncoj li faris. Kredante, ke li povas fari tiom da oro, kiom li volas, li mendis kvanton da ingrediencoj kiuj sufiĉus por fari mil uncojn. Kaj oni trovis ĉiujn ingrediencojn, krom *taburdio*. Kiam la reĝo vidis, ke li ne povas fari oron pro manko de *taburdio*, li sendis venigi la viron, kiu donis la recepton al li, kaj diris lin, ke li ne povas fari oron kiel antaŭe. Tiam la viro demandis la reĝon, ĉu li havas ĉiujn ingrediencojn de la recepto, kiun li skribis? La reĝo respondis, ke li jam havas ĉion, krom *taburdio*.

Tiam la fripono rimarkis, ke oni ne povas fari oron, se mankas iu ajn el la ingrediencoj, kiel li avertis la reĝon la unuan tagon. Kaj la reĝo demandis lin, ĉu li scias, kie oni povus trovi tian *taburdion*?

La fripono jesis.

Do, la reĝo ordonis al li, ke li iru serĉi tiun substancon kaj alportu la kvanton, kiu sufiĉos por fari tiom da oro, kiom li volos.



La fripono respondis, ke malgraŭ tio, ke iu ajn servisto de la reĝo povus plenumi tian taskon eĉ pli bone ol li, tamen li mem iros por fari plezuron al la reĝa moŝto. Tiam la reĝo demandis, kiom kostos tiu *taburdio* kaj la vojaĝo, kaj la fripono kalkulis sufiĉe grandan sumon da mono.

Kiam la fripono ricevis la monon, li forvojaĝis kaj la reĝo neniam vidis lin plu. Tiel estis trompita la reĝo pro sia malprudento. Vidante ke tiu homo ne revenis, la reĝo sendis siajn servistojn al ties domo por ke ili serĉu ian informon pri li. Kaj ili nenion trovis en la domo krom fermita kofro. Ili malfermis la kofron kaj ene trovis paperon kun jena mesaĝo:

“Bone sciu, ke ne ekzistas *taburdio* en la mondo; mi certigas vin, ke mi trompis vin, kaj kiam mi diris al vi, ke mi riĉigos vin, vi devus diri al mi, ke mi dekomence riĉigu min mem, por ke vi min kredu.”

Kelkajn tagojn poste, iuj homoj, kiuj amuzis sin ŝercante, kompilis la listojn de ĉiuj homoj, konataj de ili, laŭ iliaj karakteroj, dirante: “La ruzaj homoj estas tiuj kaj tiuj; kaj la riĉaj — tiuj kaj tiuj; kaj la saĝaj — tiuj kaj tiuj. Kiam ili faris la liston de malprudentaj homoj, ili skribis la nomon de la reĝo. Ekaŭdinte tion la reĝo ordonis venigi la serĉulojn, promesante ke li ne punos ilin. Kiam la reĝo demandis, kial ili skribis lian nomon en la liston de malprudentaj homoj, ili respondis, ke pro tio, ke la reĝo donis tiom da mono al nekonata homo, pri kiu li nenion sciis.

La reĝo diris, ke ili eraras, ĉar se tiu viro, kiu forveturis kun la mono, revenus, tio estus pruvo de tio, ke la reĝo ne estas malprudenta homo. Al kio la ŝerculoj respondis, ke se la viro revenus, ili forstrekus la nomon de la reĝo el la listo kaj enskribos tien la nomon de la viro.

Kaj vi, sinjoro grafo Lukarno, se vi volas, ke oni opiniu vin prudenta homo, ne risku en dubinda entrepreno per via havaĝo!

La grafo ŝatis ĉi tiun konsilon kaj sekvis ĝin, kaj ĝi estis utila por li.

Don Johano ekvidis, ke la rakonto estas bona kaj ordonis, ke ĝi aperu en ĉi tiu libro, kaj li eĉ verkis ĉi tiujn versojn por akompani ĝin:

Se senhavul’ promesas ke li riĉigos vin
Diru al li, ke li mem antaŭe riĉigu sin.

S-ro Marino Curnis el Italio petis nin aperigi en "K" informojn pri lia venonta vojaĝo EURASIA PEDIBUS CALCANTIBUS.

Ni trovis la ideon de nia abonanto neordinara kaj interesa kaj pensas, ke ankaŭ vi, karaj legantoj, plezure konatiĝos kun projekto de Marino Curnis, kiu okazis ne nur vojaĝema, sed ankaŭ kreema homo, kiu verkas prozon, poezion kaj ĉe pentras. Ĉe la najbara paĝo vi povas konatiĝi kun kelkaj liaj verkoj.

Marino Curnis

EURASIA PEDIBUS CALCANTIBUS

(el la latina lingvo: *Pedibus Calcantibus* = *per piedoj kiuj premas* la terenon),

Jam kelkajn jarojn mi apartenas al malvasta elito de Frenezuloj kaj samtempe Revuloj, kiuj ŝatas pasigi sian tempon sur tiu ĉi Planedo, simple ĝuante sur Ĝi la personojn, la ejojn, la saporojn, la odorojn, la eventojn, kiuj igas Ĝin nekredible alloga.

Ĉio komenciĝis en 1998, sed verŝajne la semo de la maltrankviliĝo, de la serĉado de tio, kion mi neniam trovos, la semo de la malkovro naskiĝis kune kun mia animo, kaj ili mortos nur kune. La 1998 estis la jaro de mia unua vojaĝo, sole kaj ekstere de Italio, vojaĝo kiu kondukis min dum tri monatoj en Hindion, puŝante min al tia dimensio, kiu poste iĝos al mi tiom kara, ĉar ĝi permesis al mi leviĝi al la eterna rolo de Vojaĝanto. Fakte, mi nun parolas pri ĉi malvasta aro de Frenezuloj kaj Revuloj — la Vojaĝantoj, tiuj kiuj elektis por si sorton iri antaŭen, kuraĝe kaj senkonscie, esplorante nian mirindan Terĝlobon.

Tamen, mi malkovris por mi alian vojaĝmanieron — piediradon, kiun mi faris dum la Vojo de "Santiago de Compostela". Estis distanco je pli ol 1000 kilometroj piedfaritaj ekde aprilo ĝis maio 2003, tra irante de Francio al Portugalio la tutan Nordhispanion. Piediri permesas ekkontakti la ulojn, la ejojn, la kulturon, ĉe la ŝtonojn de la trairata lando. Piediri permesas distanciĝi de rapideco, stresoj kaj materialismo, rilataj al nia okcidenta vivstilo. Piedirado permesas profunde ekkontakti sin mem, malkovrinte, kiu reale oni estas. Mi decidis aliĝi ĉi Vojaĝstilon, Vivstilon.

Mi volis esti tiu vagabondo, kiu en la infanaj revoj mi ĉiam estis. Mi volis esplori ion esceptan por mi kaj por tiuj, kiuj detale ekzamenas mian ekzistadon kun malkaŝita demandosigno en okuloj. Ion, kio montrus, ke mia vivstilo estis kaj estas... vivebla; ion, kio laŭ mi havas valoron, profundan senson; ion, kio submetus miajn instinktojn de vagantulo al ordo, al difinita plano, kiu estis rilate al ili iom brida, tamen ne deviga. Tiel en mia kapo aperis alia infana revo: reiri laŭ spuroj de Marko Polo, la mitan Silkvojon. Piede, "*pedibus calcantibus*", sen ia ombro da dubo.


Iom post iom, la ideo komencis formiĝi, starigi demandojn, peti motivaĵojn. Kiam nova ŝanĝo de perspektivo por mia futuro kristaliĝis, mi komprenis, ke tiu revo devas formiĝi, sed en *solidan* formon, kiu ne lasus dubojn al mi kaj al ĉiuj, kiujn mi volus kuntreni al ĝia realigo. La ideo estis grandega kaj pligrandiĝis de tago al tago. Tamen, mi estis firma pri mia volo realigi ĝin; firma, sed sen urĝo, kvazaŭ arkitekto, kiu projektas sian plejsuperan artaĵon.

Certeco estas ĉe mi: tiu Vojaĝo devos iĝi la supra pinto de mia futura vivo.

La Plano Piediri, "**pedibus calcantibus**" (pronuncu esperante: - Eŭrazia - Pedibus Kalcantibus), el Italio al Japanio kaj reen, tra 26 nacioj de Eŭrazio (Eŭropo kaj Azio), dum 5 jaroj kaj irante tra 40.500 kilometroj.

La Itinero antaŭvidas trapason, sole piede, de 26 landoj de Eŭropo kaj Azio. Oni antaŭvidis etapojn je 25/30 kilometroj meze po tago, trapasante kaj bordumante famajn geografiajn aŭ historiajn (kiel la *Nigra Maro*, *Monto Ararat*, *Samarkando*, *Granda Ĉina Murego*, ktp.), kun unutaga ripozo ĉiusemajne.

La antaŭvidita startdato estos Januaro 2006. Por sukcesi, la projekto "Eurasia Pedibus Calcantibus" serĉas kunlaborantojn, sponsorojn, sed ankaŭ kunvojaĝantojn. Por petoj, informoj kaj kontaktoj, bonvolu vidi la TTT-ejon: www.eurasiapc.com



Aŭtoro kaj tradukanto el itala lingvo: **Marino Curnis**

Vojaĝi

Ekiri,
ekiri sen reveno,
serĉante tion, kion neniam ni trovas
trovante tion, kion neniam ni supozas
trovi.

Cigano

al mi mem

Malfermis fenestron
por mallumo
de mia konscio
kaj vidis lumon.

Ajna domo,
ajna tendo,
la mondo
estas ejo pro mi.

Vaganto sen stabila loko
kaj rutinulo,
mi estas tio.

Do lasu min vagi
tra ĉi magra spaco
kiu pligrandiĝos

kaj senlime
kondukos mian vivon.

Arto

Zigzagas
Iluzio kaj Revo
tra mia liberkredo,

sur montetoj,
fajrigitaj neĝoj.

Energio
kiu amon ne voras,
voras esencon

kaj kaŭzas Arton!

Ŝtelita Rozo

Ĝi estas rakonto pri ŝtelita rozo, kaj mi dediĉas ĝin al vi. Ĉar iufoje la donaco plej granda kaŝiĝas kune kun etaj donacoj en angulo de malriĉega tirkesto. Ĉar iufoje la vivo komisias al sombra fantomo ŝteli al ni la juvelon, tiel ke ni retaksas sian grandegan valoron.

Iam (multaj lunoj kaj multaj sunoj estas nun jam forpasintaj), ekzistis Norde tre granda kaj miriga valo, kisata de suno kaj de ĉiu kreitaĵo. Tage, karesita de suno kaj vento, ĝi svarmis per pluraj vivantaj estaĵoj: belecplenaj dioj, kaj fajnaj elfoj, laboremaj nanoj kaj altegaj homoj. Nokte, kiam ili dormis, la valo plenigis per ĉio, kion naturpatrino kreis aŭ nur imagis. Kaj la suno, kaj la luno, kaj steloj povis vidi de ĉielo kiamaniere paco, kvieto kaj silento regis senkontraste.

La nomo de ĉi tiu valo estis "Veritecosonĝo". Estis, ĉar nun ne plu estas.

Tamen, lasu ke mi kantus al vi sian historion...

Kiam oni ankoraŭ komprenis malsamecon inter Bono kaj Malbono, la maljuna bona reĝo Neĝkovritaharo, tiel nomata pro sia arĝenta hararo, nun jam feliĉe alvenita al sia vivfino, kunvenigis ĉiujn loĝantojn de "Veritecosonĝo" ĉe valomezo: "Miaj gekaraj, maljuna por mi estas nokto, kaj mi devas adiaŭi. Dum mi regadis, "Veritecosonĝo" konis la pacon, ĉar bono kaj malo ĉeestis inter ni sen masko. Tiel estu ĉiam! Tamen, nun ĉar mi foriras, mi timas pro vi. Pro tio mi elektis lasi al vi admonon, kiu vin alarmados kontraŭ malbono, kaj memorigos al vi la bonon. Mi metas inter vi Eternan Rozon. Nigraj kiel ĉielo dum nokto estas ĝiaj petaloj, kaj samtempe lazuraj kiel ĉielo dum tago. Neniam vi laciĝos admiri kaj gardi ĝin, ĉar el ĉiuj donacoj ĝi estas la plej altvalora, kaj la Malbonsinjoro de Glaciejoj avidos posedi tian grandegan donacon."

Multaj vivoj forpasis post la morto de reĝo Neĝkovritaharo, kaj bedaŭrinde lia memoro mortis kune kun li. Ĉi Veritecosonĝo la popolo komencis forgesi Malbonon kaj Bonon, la Rozon kaj la admonojn de antikva saĝa reĝo. Kaj eĉ maljunuloj, kiuj ankaŭ ion memoradis, ekskuzis ĉion per konsidero, ke neniam la Malbonsinjoro de Glaciejoj sin ĝenis pro ili.

Tiel, Malbono kaj Bono remetis maskojn, kaj neniu ĉe Veritecosonĝo ilin plu rekonis. Kaj neniu plu rekonis Veritecosonĝon. Fakte, la nordaj popoloj rakontadas, ke la Malbonsinjoro de Glaciejoj, vidinte senzorgan, senprotektan Rozon de Neĝkovritaharo, decidis ĝin alproprigi al si inter ĝenerala indiferecenteco. Kaj ne nur! Li ankaŭ decidis puni stultajn loĝantojn de Veritecosonĝo! Tamen, se vi renkontas nordlandan viron de via belega planedo, petu lin montri, kie estus Veritecosonĝo. Tujtuje li indikos al vi glacian forlasitan teron, indifereentan pri ĉio kaj ĉiuj. Ĉi nordaj popoloj, kaj ĉiuj uloj, kiuj loĝas ĉe via planedo, ĝin nomas "Norda Poluso"... Ĝi nur atendas, denove, sian Rozon.

Vladimir Phungian,
Esperantigis **Sergei Paĥomov** [Kirov, Rusio]

Lingvo kaj geografio

Antaŭe ni parolis pri transformado de lingvo dum tempo (legu Komencanton N 3, 2004). Tamen ĉiu lingvo ekzistas ne nur en tempo sed same en spaco. Kaj ĝi konstante transformiĝas en tempo kaj en spaco. Ni ofte diras: rusa lingvo, angla lingvo ktp. Iam ni aldonas: moderna rusa lingvo, rusa lingvo de 18a jarcento. Tiel ni substrekas ke kvankam lingvo estas la sama tamen iom alia ol moderna. Ankaŭ rusa lingvo en vilaĝo apud Moskvo kaj en vilaĝo apud Rjazanj kaj en vilaĝo apud Vologdo ne estas la sama. Angla lingvo en Aŭstralio, en Hindio kaj en Ameriko same estas iom diversaj lingvoj. Aŭstraliano kaj usonano ne ĉiam facile komprenas unu la alian dum renkontiĝo. Se vi bone scipovas la germanan, kaj parolis kun germanoj, do vi scias ke estas grave kompreni de kie devenas via kunparolanto: se li estas bavaro el Munkeno, li parolas alie ol Berlinano, sed tiu parolas alie ol Hamburgano... Same en aliaj lingvoj vi trovos diversajn etajn aŭ grandajn distingojn.

Nenio mirinda estas en tio. Ĉar eĉ niatempe loĝantoj de unu urbo ne ofte komunikigas kun aliaj urbanoj najbaraj, des pli kun malproksimaj. Antaŭe interkomunikado estis eĉ pli limigita ĉar forestis komputeroj, telefonoj, radio, televido kaj transportiloj. Eĉ en unu lando homoj de diversaj regionoj, recipe kamparaj, ne povis interkomunikadi. Tial ŝanĝoj de lingvo en unu regiono ne estis transdonataj al alia regiono, sed tie, en la alia regiono, siavice povis aperi aliaj ŝanĝoj.

Landoj Germanio kaj Italio ĝis 19a jarcento konsistis el multaj malgrandaj ŝtatoj (aŭ apartaj urboj kun najbaraj vilaĝoj). Ĉiu ŝtato vivis per sia izolita vivo kaj tial ĝuste la germana kaj la itala en nova tempo iĝis la plej "diversgentaj" kvazaŭ kunmetitaj el diversaj ĉifonoj. Ĝuste tial malfacilas difini kio estas literaturaj germana kaj itala lingvoj. Ĉi kaze por angloj, francoj, rusoj pli facilas: modela angla lingvo estas tiu de Londono, modela franca estas tiu de Parizo, modela rusa estas tiu de Moskvo. Sed kiel esti en lando kie ankoraŭ nelonge forestis unu komuna ĉefurbo? Kie parolado de Romanoj estas nek bone, nek malbone ol de aliaj urbanoj? Fin-fine okazis ke literatura itala lingvo plej similas al parolado de Florencanoj, sed literatura germana lingvo al parolado de loĝantoj de suda kaj precipe meza Germanio. Tiuj ekzemploj montras al ni ke lingvoj ŝanĝiĝas.

Diversaj variantoj de unu lingvo, disvastigitaj en diversaj geografiaj punktoj, nomiĝas **dialektoj** de la lingvo. Estas germanaj, italaj, rusaj dialektoj. Malmultas lingvoj kiuj ne havas dialektojn. Ekzemple en Dagestano estas montaraj vilaĝoj kun diversaj izolitaj lingvoj.

Distingo inter lingvo kaj dialekto.

Kial ni diras ke en Vologdo estas vologda dialekto de rusa lingvo, sed ne vologda lingvo? Kial italoj diras pri sicilia dialekto de itala lingvo, sed ne pri sicilia lingvo? Ja ili estas diversaj!

Vi povas diri ke ili ne estas jam tro diversaj. Ĉar moskvano komprenas vologdanon, kaj veneciano komprenas sicilianon. Nu, ili efektive komprenas unu la alian, kvankam ne ĉiam bone. Ankaŭ rusoj komprenas belorusojn, eĉ polojn iom pli malbone. Tamen la belorusa kaj pola estas apartaj lingvoj, sed ne dialektoj de rusa lingvo.

Aliflanke en Ĉinio estas dialektoj de ĉina lingvo. Sed loĝanto de ĉefurbo Pekino povas ne kompreni paroladon de loĝanto de Suda Ĉinio. Kvankam temas pri dialektoj!

Male, danoj komprenas bonege norvegojn kaj povas legi norvegajn gazetojn same kiel siajn danajn. Tamen ĉi kaze neniu nomas norvegan lingvon dialekto de la dana aŭ kontraŭe. Kial?

Oni povas diri ke en Ĉinio vivas ĉinoj kaj lingvoj estas ĉina, sed norvegoj kaj danoj en diversaj landoj do estas diversaj lingvoj. Bone. Sed kial aŭstroj loĝantaj en Aŭstrio parolas en aŭstra dialekto de germana lingvo, sed ne en aŭstra lingvo? Kaj brazilanoj loĝantaj en Brazilo, parolas en brazila "varianto" de la portugala, sed ne en la brazila? Same ne ekzistas lingvoj aŭstralia, kanada, usona, sed estas nur diversaj specoj de la angla en la landoj. Parte tial ke nocioj **lingvo** kaj **dialekto** uzatas ne ĉiam konsekvence (logike). Ne eblas mezuri distingojn inter lingvo kaj dialekto per iu ajn mezurilo. Kiam lingvistoj decidas kiel nomi parolon de loĝantoj de iu regiono, ĉu aparta lingvo, ĉu dialekto de alia lingvo, ili unue konsideras opinion de la loĝantoj mem. Dialekto havas du ĉefajn signojn.

Unue, ĉiuj dialektoj de iu lingvo estu lingvistike proksime parencaj unu al aliaj. En nordaj vilaĝoj de Rusio kunloĝas rusoj kaj kareloj. Lingvoj rusa kaj karela delonge kunekzistas sed ni neniam nomas ilin dialektoj de unu lingvo, ĉar ili apartenas al diversaj lingvaj familioj.

Due, dialekto uzatas de parolanto ĉiam alie ol "plenrajta" (aŭ literatura) lingvo. Se vi parolas literaturan lingvon, vi povas uzi ĝin ĉie: hejme, inter amikoj, en lernejo, en radio, gazetoj, libroj, televido. En sia lando, en sia "hejmo" literatura lingvo kutime ne havas konkurantojn. Alie uzatas dialekto: en ĝi oni ne eldonas revuojn, kaj kutime tute ne skribas, ne parolas en radio, malofte parolas ekster sia domo aŭ vilaĝo, aŭ distrikto. Uzado de dialekto oficiale ne eblas. Rilatoj inter dialekto kaj literatura lingvo ne estas egalaj. Do por nomi parolon de loĝantoj de iu regioneto dialekto, ekzemple, de germana lingvo, necesas ke:

ĝi estu proksime parenca al literatura germana lingvo (tio ne signifas ke ĝi tre simulu al germana lingvo);

estu uzata nur kiel parolo "inter siaj" sed en aliaj okazoj cedis al literatura germana.

Kutime la parolanto bone konscias tian situacion de la afero. Tial, ekzemple, bavaroj ĉiam respondas ke ili parolas en la germana. La lasta distingo de dialekto: la parolantoj kvazaŭ "ne rimarkas" ke ilia dialekto ne koincidas kun literatura lingvo. Loĝantoj de Bavario opinias sin germanoj kvankam parolo de bavaroj distingiĝas de parolo de berlinanoj pli multe ol paroloj de norvego kaj dano inter si. Tamen norvegoj ne opinias sin danoj kaj norvega lingvo uzatas en Norvegio absolute ĉie. Ĉi tio estas tre grava difirencio, distingo: kion homoj opinias, konsideras sian lingvon. Kaj lingvistoj uzas terminon dialekto tre atente, konsiderante ĉiujn faktojn. Tial ekde unua rigardo ŝajnas tre komplikaj rilatoj inter lingvoj kaj dialektoj en diversaj landoj.

Ŝanĝoj

Tiel same malmulte, kiel per la gustoj *personaj*, ni devas nin ankaŭ gvidi en niaj proponoj per gustoj *naciaj*, se la proponoj havas nenian alian celon ol nur flati nelerte tiun aŭ alian nacion, alportante per tio ĉi nenian utilon al la nacio kvazaŭ flatata, kaj grandan malutilon al la afero mem. Tiel ekzemple unu sinjoro, kiu nun apartenas al la plej varmaj amikoj de nia lingvo, en la komenco estis forte kolera kontraŭ ĝi en la kaŭzo, ke "ĝi ne estas sufiĉe internacia", ĉar ĝi enhavas preskaŭ nenian vorton rusan. Multe ni jam devis suferi de tiu malvasta pseŭdo-patriotismo, kun kiu diversaj personoj renkontis nian aferon, kies devizo estas "frateco de la popoloj". Dum unuj malamike renkontis nian aferon en la kaŭzo, ke nia unua debuto, la unua lemolibro de nia lingvo, eliris en la lingvo rusa — la supre dirita sinjoro en la unua tempo trovis, ke nia afero estas "malamika al la rusa popolo, ĉar... Volapuk havas la rusan vorton "ibo", dum ni donis por ĝi la ŝanĝitan francan vorton "ĉar"!

Unu redaktoro de sveda gazeto trovis, ke nia lingvo havas karakteron tro italan. Kiam ni ne povis akcepti lian proponon kaj sen ia celo "malitaligi" nian lingvon, la proponinto ne longe atendis kaj provis fari mem lingvan miksaĵon, kiu laŭ lia opinio devus pli plaĉi al la nordaj popoloj. Ni ne bezonas rakonti, kio fariĝus en nia afero, se ĉiu popolo volus el simpla vanteco doni al ĝi sian propran karakteron. Nia afero fari 17us absolute neebla. Kaj se ĝi eĉ estus ebla, — ĉu la flatita popolo mem ion gajnus de tio? La dirita sveda sinjoro, kiu en la komenco diris, ke liaj ŝanĝoj estas *necesaj*, kaj faris provojn en daŭro de kelka tempo, nun vidas jam, al kio ĝi lin kondukis: la lingvo fariĝis malbonsona kaj malregula, kaj el la svedoj mem, por kies nacia flato li volis pereigi nian aferon, neniu akceptis liajn ŝanĝojn, dum nia lingvo en ĝia nuna formo, kiu estas tiel "malsveda", havas multajn amikojn inter la svedoj kaj estas al ili multe pli oportuna kaj pli hejma, ol la svedigita, kiu mortis, antaŭ ol ĝi akceptis ian difinitan formon.

Unu el niaj svedaj amikoj trovis, ke la lingvo internacia devas havi tiom same da slavaj vortoj, kiel da romana-germanaj. Li ankaŭ volis krei novan lingvon, kiu enhavus en si multajn vortojn slavajn; sed baldaŭ li konvinkiĝis, ke ne sole al aliaj popoloj, sed al la *slavoj mem* multe pli oportunaj kaj agrablaj estas niaj vortoj romana-germanaj, ol la vortoj slavaj kiuj, enmetite en sistemon, romana-germanan, tranĉas la orelon kaj fariĝas al la slavoj mem multe malpli kompreneblaj, ol la vortoj ne slavaj. (Se ni bone memoras, la vorto "internacia" tie estis tradukata "meĵufoka", sed ni petus, ke iu slavo diru al ni, kion pli bone komprenas kaj memoros, vorton "internacia" aŭ "meĵufoka"? li estas preta serĉi la vorton en la ĥina vortaro, kaj al li eĉ ne venos en la kapon, ke la vorto estas kunmetita el lia propra slava "meĵdu" kaj la germana "Volk", perdinte *d* kaj la *l*, ĉar ankaŭ 2 konsonantoj ne devas stari kune!). Se la amiko, egale al la aliaj, farus sian proponon nur *teorie*, li eble eĉ nun



estus ĉe sia opinio kaj eble kolerus nin, ke ni estas tiel obstinaj kaj ne volas enkonduki tiun ĉi "necesan" ŝanĝon; sed feliĉe li faris provon *praktikan*, kaj la praktiko lin plej bone konvinkis, kaj nun li denove fariĝis tre varma amiko de nia lingvo en ĝia *nuna* formo.

El la diritaĵo ni povas eltiri la sekvantan regulon: se ni volas proponi aŭ fari ian ŝanĝon, ni devas nin demandi, kian utilon la ŝanĝo alportus al la lingvo mem, kaj ĉu la utilo de la ŝanĝo kovrus la malutilon; sed ni neniam devas obei senfondajn gustojn kaj la simplan vantecan de ia aparta nacio, ĉar tiam ni malutilon alportus al nia afero grandan kaj utilon ni alportus al neniu neniam. En ĉiuj okazoj, kiuj ne estas absolute gravaj per sia enhavo mem, vantaj senkaŭzaj gustoj naciaj devas en afero internacia tiel same absolute silenti, kiel la gustoj personaj, se ni ne volas el persona aŭ nacia disputemeco pereigi nian aferon; tiuj ĉi gustoj devis silenti jam en la tempo de la kreado de l' lingvo, kaj tiom pli ili sendube devas silenti, se ilia obeado postulas rompardon en nia lingvo.

la blua koloro estas pli verda ol flava

SPONTANAJ AFORISMOJ

elektis Cezar, [Altenburg, Germanio]

Tiajn dirojn oni kaptis, kiam nia ministro por eksteraj aferoj,
Josef Fischer en Germanio ankoraŭ faris politikon kun sportŝuoj kaj sen
kravato. Estas tielnomataj "Sponti-Sprüche", do diroj de spontanuloj.

Ankaŭ profundaj akvoj estas
malsekaj.

*

Devi kaj ne rajti estas la samo.

*

En la realeco la vero estas tute
alia.

*

Ju pli iu ne komprenas ion, despli
li parolas pri tio.

*

Kiu ne scias, kion li volas, sciuj
almenaŭ kion la aliaj volas.

*

Kiu sidas en vitrodomo
malvestiĝu en la malhelo.

*

Kutime la teksto komenciĝas per
la unua frazo.

*

La blua koloro estas pli verda ol
flava.

*

La borado en la nazo ankoraŭ ne
estas pensado.

Mi faras ĉion por vi, sed kiom vi
pagas por tio?

*

Mia opinio estas jam fiksa, ne
konfuzu min per viaj faktoj.

*

Ne investu sentojn, sed fordonacu
ilin.

*

Ne permesu al mi, kion vi ne
povas malpermesi al mi.

*

Nenio estas nenio, sed iom ankaŭ
ne estas multo.

*

Ni ŝparu, kiom ajn kostas!

*

Niaj antaŭuloj ankoraŭ iris en la
arbarojn, sed ni veturas aŭtojn.

*

Se ĉiuj estas por io ankaŭ mi estas
kontraŭ ĝi.

*

Se mi estus vi, mi prefere estus
mi.

Vaste konataj en Rusio frazoj de
Viktor Ĉernomirdin,
ekspremiero de rusia registaro,
prononcitaj de li dum oficialaj
aranĝoj

Ĉio estas tiom rekte kaj
perpendikle, ke al mi estas
malagrabla.

*

Ie ni ion tion tie, malantaŭe,
timetas.

*

Bedaŭrinde, kiel malvivaj animoj
aspektas iuj niaj kolektivaj
membroj.

*

Belajn virinojn mi sukcesas nur
rimarki. Kaj nenion plu.

*

Multon mi scias. Eble eĉ
superfluan.

*

Ni plenumis la tutan liston, de A
ĝis B.

*

Ni estas viroj kaj scias, sur kio ni
sidas.

*

Ni volis kiel pli bone, sed
rezultiĝis kiel ĉiam.

*

Ne necesas pensi, kaj eĉ ne indas
pensi, ke venos la tempo, kiam
estos pli facile.

*

Ni tiom bone vivos, ke al ni
nepoj kaj pranepoj envios!

*


Mi al la rusa lingvo demandojn
ne havas.

*

Mi havas proksimume du filojn.

*

La rezulto estos eĉ pli malbona.
Mi tion scias, tio estas mia
laboro.



Všivceva Galina [Miass, Rusio]

Mi sendas al vi tekston, verkitan de unu el miaj retlernantoj **Henri-Claude Matton** [Pont-sur-Sambre, Francio]. La solvo de la enigmo devos aperi sur alia numero. Amike **Martin Ginette** [Soulxures/Moselotte, Francio]

Orienta fabelo

(nekonita aŭtoro)

Iam, maljuna Dezertosinjoro alvenigis siajn gefilojn kiuj estis tri, kaj aldiris ilin :

Mi sentas alproksimiĝi la morto. Hodiaŭ, mi decidis dispartigi mian solan bienon - miajn kamelojn- inter vi.

Vi, la plej aĝa, havos la duonon de ĉio, la dua havos la trionon, fine la trienaskita havos la naŭonon.

La filoj ne protestis. Ili konis la leĝon de la Dezerto. Ne temis pri administraj paperoj. La malgrandaj bienoj transdoniĝis parole, simple.


La patro benis siajn filojn. Iom da tempo pli poste, li mortis. Liaj infanoj ploris lin. Iun tagon, ili kunvenis por partigi la kamelojn laŭ la patrovolo. Oni nombris la bestojn kaj tie, stranga afero ! Estas dek sep kameloj ! La filoj sidintaj sub la tendo parolis kaj paroladis dum tagoj sen alveni al justa partigo. Kiel dividi dek sep per du, tri, naŭ ?

La afero postulis la intervenon de kvara persono. Ili fine decidis peti helpon de Dezertojuĝisto !

Post mallonga tempo, alvenis la juĝisto altesidanta sur belega kamelo. Oni enloĝiĝis lin sub la tendo, trinkis la teon, laŭ la kutimo. Post multaj diskutoj, oni alvenis je la fakto. La Dezertojuĝisto meditis pri tio longe kaj parolis

Nu, kara leganto, kiel li solvis la malfacilan partigon de la heredaĵo inter la filoj ?

Allah helpu vin ! ĝis...






(la redakcio atendas viajn solvojn de tiu komplika tasko!)

Kompilis Alikin Viktor [Permj, Rusio]

KRUCVORTENIGVO DISFALIS

El apartaj pecetoj konsistigu kompletan krucvortenigmon!



Respondoj al la taskoj el "Komencanto"-1-2005

Vortenigmo MARATONO:

1. Madagaskaro
2. oranĝeri
3. iluminad
4. dromedar
5. radon
6. neniam

Fiŝeto



Logika enigmo "Tri amikoj":

Blankov havas rufajn harojn,
Nigrov - blankajn,
Rufov - nigrajn.

Korekte respondis al ĉiuj taskoj

Loŝ manov Anton,

[Komsomolsk-sur-Amuro, Rusio]

Korekte solvis la vortenigmon MARATONO

Jackie Huberdeau [Le Mans, Francio]


Karaj legantoj! Al via atento ni volas prezenti la libron, kiun kompilis kaj eldonis populara rusia kanzonisto kaj poeto Anatolij Radaev el urbo Samara (Rusio). Dum pluraj jaroj A. Radaev interesiĝis pri kreado de fama E-poeto Nikolaj Ĥoĥlov, li tradukis preskaŭ ĉiujn poemojn de N. Ĥoĥlov el Esperanto al la rusa lingvo kaj al kelkaj kompilis belajn melodiojn.

Nikolaj Ivanoviĉ Ĥoĥlov por ŝatantoj de esperanto-poezio estas klasikulo kaj konata kiel unu el pioniroj de E-movado kaj pioniro de verkado en la lingvo internacia. Li naskiĝis la 31-an de januaro 1891 en Moskvo, do, la saman jaron, en kiu naskiĝis *Kalmano Kalocsaĭ, Julio Bagru, Hendrik Adamson kaj Georgij Deŝkin*. La tuta plejado! Ĥoĥlov esperantistiĝis en 1905. Post fino de la komerca lernejo li eklaboris en Moskva ĉefpoŝtejo. En 1909 li jam aktive propagandis Esperanton, en 1912 li dissendis milojn de propagandiloj al ĉiuj anguloj de Rusio. La unua lia versaĵo aperis en 1910.

Post bolŝevista revolucio en Rusio Nikolaj Ĥoĥlov estis devigata forlasi la patrujon kaj post pluraj aventuroj li enloĝiĝis en Kroatio, en Zagrebo, kie li daŭre aktivis kiel esperantisto, tradukisto kaj poeto, konata sub pseŭdonomo "Skito". Tiel en "Kroata Esperantista poemaro" N. Ĥoĥlov estis prezentita kiel kroatia E-poeto. Krom poeziaj verkoj el sub lia plumo aperis ankaŭ brila amuza komedia teatraĵeto "La morto de delegito de UEA" (Zagrebo, 1924).

Nemultaj verkoj de N. Ĥoĥlov estis eldonitaj. Libroforme aperis nur menciita komedio kaj versaĵaro "La Tajdo" (Berlin, 1928). Nur kvardek versaĵoj estis en tiu libreto, sed preskaŭ ĉiu el ili estis vere majstra. "Ilia ĉefa trajto estis bildeco. Ĥoĥlov sciis rezoni per bildoj, kaj tiuj estas ĉiam neatenditaj kaj trafaj. Tial liaj la plej filozofiaj versaĵoj estas plenaj je belo kaj ĉarmo", skribis konata esploristo kaj tradukanto de N. Ĥoĥlov B. Tornado.

Krome, ĉiu lia versaĵo havas kvazaŭ sian muzikan melodion. Kaj vere, laŭ atesto de lia amiko Ivo Rotkviĉ, Ĥoĥlov, verkante poemojn, fajfis melodiojn, kaj akompane de la sonoj ĉe li aperadis rimoj kaj versoj. "Tiom muzikecaj verkoj estas nemultaj eĉ en la monda literaturo", — rimarkis B. Tornado.



Nikolaj Ĥoĥlov "Mia Vojo".

Versaĵoj. Samara, 2005.
Kompilis kaj redaktis
Anatolij Radajev

Muzikecon de poezio de N. Ĥoĥlov kaptis Anatolij Radajev, kiam li antaŭ 20 jaroj por la unua fojo konatiĝis kun poemo "Chante-Claire" kaj legis ĝian ruslingvan tradukon far de Tornado (Boris Tokarjev). La vorto estis vere kantemaj kaj muzikemaj. La kanto "Chante-Clair" iĝis vere populara inter rusia esperantistoj en plenumo de A. Radaev.

En la libro, kiu havas titolon de unu el tre konataj versaĵoj de N. Ĥoĥlov "Mia vojo" estas publikigitaj poemoj de N. Ĥoĥlov kun paralela traduko en la rusan lingvon. Tial tiu ĉi libro povas servi kiel bonega helpilo por komencantaj esprantistoj kaj komencantaj aŭtoroj. Kaj povas servi, laŭ opinio de A. Radajev, kiel bonega propagandilo de Esperanto inter nesperantista publiko en Rusio.

La kantojn "Mia vojo", "Viburmo", "Vintra fabelo" kaj aliajn A. Radaev plenumas dum siaj koncertoj kaj ili aperis en kelkaj K-Disko, kiuj profesie kaj bonkvalite eldonitaj de Anatolij.

Ĉi sube al via atento estas prezentita unu el la plej konataj versaĵoj de N. Ĥoĥlov tiel, kiel tio aspektas en la libro.

Mia vojo

Mi levas mian kapon en ĉielon,
Sed per piedoj staras sur la ter'.
Nur idealajn vidas kiel celon,
Sed nutras min per krudreala ver'.

Sur montoj kreskas mia sorĉa foro,
Sed en la valoj kuŝas mia pan',
Altiras la animon ĉiu floro,
Sed ankre tenas ĝin la karna man'.

Al ĉiu bel' mi venas tra la tera,
Tra la dolora aŭ ĝuiga prov'.
Sen tiu voj' ĝi estus nur ĥimera,
Tuj paliĝonta post la brila nov'.

Samtial preĝas mi dum ardaĵ kisoj
Kaj pliĉastigas en volupta trem',
Kaj la anim' la blankon de narcisoj
Ne perdas en frivolo de l'poem'.

Мой путь

traduko de A. Radaev

Душой и сердцем я летаю в небе,
А наяву шагаю по земле.
Мой идеал – там, где я прежде не был,
Но жизнь реальная питает не во сне.

На скалах – мой растет цветок волшебный,
В долине – мой растет насущный хлеб.
А душу манит в даль нектар целебный,
Но якорь быта вновь мешает мне.

Земную жизнь я познаю в сравненье,
На личном опыте я убеждаюсь в том, –
Мой путь сегодня является лишь тенью
Блестящей жизни, что ждет меня потом.

И я молюсь, грешу, и снова каюсь,
И в вечном поиске мечтания мои,
Но в легкомыслии моих стихов – я знаю
Не лгал пред Богом и перед людьми.

Vi povas aĉeti libron ĉe la
redakcio de "Komencanto" Por
rusianoj tio kostos 80 rublojn
kun sendokosto.
Por eksterrusianoj – 7 eŭrojn
kune kun sendokosto

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 21-jara studentino. Intereso: geografio, naturo, literaturo, pentrado, sporto, muziko.

Kornjhina Anna

Altajskij kraj, 656015,
Barnaul, Depovskaja, 20-27

Rusio

espern/a;uic.asu.ru

Mi estas 12-jara knabo, komencanto. Mi deziras korespondi kun samaĝaj geknaboj. Int: bestoj, surgrimpado, muziko, manĝaĵoj.

Devĉo

Austin, TX,

Usono

plumo.amiko.devan@recursor.net

Mi estas viro, 23-jara, komencanto. Int: libroj, skribi, programi, politiko, muziko, radio.

Victor Annergard

Reavägen 3c
S-458 31

Svedio

vitte.annergard@gmail.com

Mi estas 34-jara viro, komencanto. Int: piedvagi, tendumi, amatora radio. Mi serĉas amikojn el Eŭropo, kaj Rusio.

Taylor Francis

PO Box 216
Morrilton, AR 72110

Usono

ka5nom@netscape.net

Mi estas viro, 50-jara. Int: kulturo, vojaĝoj, Esperanto, spiritualismo.

Cesar Dorneles Soares

Porto Alegre,
Rio Grande do Sul

Brazilo

cdornelessoares@yahoo.com.br

Karaj samideanoj! Mi estas Sergej Paĥomov, mi petas: Skribu kaj pruvu al mia ĉarma kuzino nur ANGLE ke E-o estas la plej bona ktp., kaj pri ĉiuj aliaj temoj ŝi interesiĝas.

Smirnova Natalja

ab. k. 412, Nizhny Novgorod., 603137, **Rusio**

Por klarigoj al mi: pacahomo@espero.kirov.ru

Mi estas 23-jara junulo. Mi laboras por filmo kompanio kaj estas tre interesita pri aliaj kulturoj. Int: filmoj, legi, muziko, pentri, promeni, vojaĝi, skribu paper- aŭ ret-poŝte.

Johannes Reschl

Markhofgasse 2a/22
1030 Vieno

Aŭstrio

mcraven@gmx.net

Ĉiam konstante akceptas korespondproponojn
Japana Esperanto-Korespond-Servo

Japana Esperanto-Instituto
JP-162-0042, Wasedamati 12-3,
Sinzyuku-ku, Tokio, Japanio

<http://www.2s.biglobe.ne.jp/~jei/hp/koresp.htm>
jei@mre.biglobe.ne.jp

Mi estas 52-jara viro, instruisto de historio kaj lingvoj. Mi ŝatus korespondi pri ĉiutaga vivo. Kembriĝo estas universitata urbo 70 kilometrojn norde de Londono, kaj mi loĝas en vilaĝo apude en la kamparo. Mi preferas ret-poŝton.

William Sellwood

Kembriĝo.

Britio

William.sellwood@hotmail.co.uk

Nova adreso de Londona E-Klubo skribu al S-ro Nora Brawn 17 Westbury Drive Brentwood CM 14 4JZ ?

Britio

Mi estas bonfarta 75-jarulo, esperantisto de 10 jaroj. Int: arto, klasika muziko, skribado, amikeco. Mi ŝatus korespondi kun ajnaĝa homo. Mi povas konsili/helpi komencantojn.

Francesco Gaeta

Peypin

Francio

fra.gaeta@cegetel.net

Mi estas viro 45-jara, komencanto. Mi loĝas kun amikino en montara vilaĝo. Mi estas ekologia-sociala aktivisto.

Int: Ekologio, naturprotektado, vegetarianismo, vagado en naturo, alternativa ekonomio, biologa ĝardenado, biciklo, popolaj kantoj, dancoj kaj kutimoj. Mi preferas paper-poŝton.

Igor Chyra

Zajcova 132
962 63 Pliesovcc

Slovakio

ichy@changenet.sk

Mi estas 15-jara knabo, progresanto. Int: historio, filozofio, lingvoj, kulturoj, scienc-fikcio. Mi ŝatas aŭdi mezepokan, klasikan, folkloran kaj rokan muzikojn. Mi kolektas poŝtmarkojn. Mi serĉas homojn ĉefe el Francio, Ĉinio, Rusio, Grekio. Aĝo ne gravas.

Matheus Guimarães Mello

Gojano, Gojaso,

Brazilo

mateo@pop.com.br

Mi estas 44-jara virino. Mi estas instruistino. Mi instruas matematikon, hispanan, japanan, kaj anglan lingvojn. Mi komencis lerni E-ton antaŭ du monatoj. Mi preferas paper-poŝton. Mi deziras korespondi tutmonde (aĝo ne gravas).

Mara Stelo Cardenas

PO Box 711823
Santee, Kalifornio
92072-1823

Usono

intercambios@aol.com

Mi estas 25-jara viro, laboristo, komencanto. Int: kulturo, literaturo, historio, sporto, muziko.

Moto N

Tokio

Japanio

motsu.n@docomo.ne.jp

Mi estas 22-jara viro. Int: vojaĝoj, muziko (rock), legado, filmoj. Mi lernis E-ton por vojaĝi kaj interŝanĝi.

Sébastien Charpentier

2 ter route d'Eu
76340 Blangy, Bresle

Francio

bricedenice.charpentier@laposte.net

komencanto@r66.ru

<http://Komencanto.narod.ru>

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

